Walter Klag
Alfred Heiligenbrunner
Lengyel Pál
Mária Minichová kaj Marteno Minich
Holli67

# SAT.IROJ




Oka kajero

Unua eldono Vieno 2019
Eldonejo kaj presejo Klag
Vieno, Aŭstrio, Eŭropa Unio
esperanto@chello.at
ISBN 978-3-903247-28-4




La aprokakaniajn desegnojn faris
Wilhelm Busch
[vilhelmo buŝo]

Por Sat.iroj 9 ni urĝe serĉas kontribuantojn.
Bonvole skribu al la eldonejo.

# HAVO ENA

PARTO UNUA
ŜERCOJ DE ALFRED

PARTO DUA
ALBUMO FINVENKA

PARTO TRIA
VORTLUDOJ

PARTO KVARA
LA SISTEMO KLERIGA EN APRIO-KAKANIO DAŬRIGO

PARTO KVINA
LA URSO

# PARTO UNUA
# ŜERCOJ DE ALFRED

Diras la klarvidistino:
„Via edzo baldaŭ mortos violentan morton.”
„Kaj mi? Ĉu tribunalo kondamnos min?“

Pro kio anasoj havas piedojn kun naĝ-haŭto inter iliaj piedfingroj?
Por pli bone estingi fajron.
Pro kio elefantoj havas simplajn dikajn piedojn?
Por pli bone estingi brulantajn anasojn.

La matematikaj funkcioj $e^x$ kaj $x^{-1}$ interparolas.
Diras $e^x$ al $x^{-1}$: „Vi ne estas kontinua ĉe x=0.“
Respondas $x^{-1}$: „Tio ja ne estas argumento!”

Viro post sia morto venas al ĉiela pordo.
Petruso demandas: „Ĉu vi estis en purgatorio?“
Viro: „Ne, sed mi estis edzo dum 40 jaroj!“
Petruso: „Bonvolu eniri, vi certe sufiĉe suferis.”
Venas alia viro.
Petruso: „Ĉu vi estis en purgatorio?“
Viro: „Ne, sed mi edziĝis, eĉ dufoje!“
Petruso: „Iru al purgatorio! Malfeliĉon mi povas kompati, sed stultecon ne!“

Jam iom aĝa virino konfesas al pastro: „Mi malĉastigis 16-jarulon!”
Pastro: „Multon mi kredas al vi, sed ne tion!”
Virino: „Nu jes, tio okazis jam antaŭ 40 jaroj. Sed mi ŝatas konfesadi tion!“

Paŭlo kaj Irena dum lernejaj ferioj restas kelkajn tagojn ĉe avino.
Antaŭ enlitiĝo Irena laŭte kriante preĝas: „Kara Dio, mi ŝatas ricevi poŝtelefonon, lud-komputilon kaj biciklon!”
Paŭlo konsternita demandas: „Irena, kial vi tiom krias? Dio ja ne estas surda!”
Irena: „Dio ne, sed avino jes!”

Ŝerco de „Holli67“, el Duolingo-diskutejo:

A: „Vi aspektas kiel mia edzino. Krom la barbo.”
B: „Sed mi ne havas barbon.”
A: „Vi ne.”

## PARTO DUA
## ALBUMO FINVENKA




SAKO
Architects



SAKO BAG




sako
demand perfection







HUNDO
visit sharkshock for more!

NEBONA
GEWÜRZE

BELIGI
LONDON


Gewürze = spicoj


fia worldwide
ENTERTAINMENT AGENCY




Volonte, sed kien?


PERDO
S&T Postgraduate Education
and Research Development Office








Vina venko, biero mortas subite
Trovita de Mária Minichová kaj Marteno Minich, Slovakio
Temas pri griota biero

PARTO KVARA
VORTLUDOJ




# FEBRU.ARO



fe.bru.aro

# Vortkombinoj de Alfred

Mi iom ludis kun vortaro kaj trovis vortkombinojn, kie la dispartigo en h-sistemo estas dusignifa.

Ekzemple:

| vorto | ekzempla frazo |
|---|---|
| falshoko | Pro fals-hoko al fal-shoko |
| penshalto | pens-halto dum pen-shalto |
| senshalo | sen shalo al malvarma sens-halo |

Jen eblaj kombinoj kun konekta litero -s- kaj ne tro raraj vortoj.

| | | |
|---|---|---|
| fal | | |
| fik | | |
| flu | | |
| kok | | hak |
| mar | | hal |
| pen | -s- | haltad |
| pul | | halt |
| sek | | hel |
| statu | | hok |
| val | | |
| ver | | |

# PARTO KVARA
# LA SISTEMO KLERIGA EN APRIO-KAKANIO
## DAŬRIGO DE KAJERO 7



En la bela lando Aprio-Kakanio estas kvar lernejoj. Ĉiu volas esti la plej bona. Tial oni aranĝis teston por eltrovi la konojn de la gelernantoj. La rezulto estis tute klara. El 500 poentoj ricevis:

Lernejo A ... 449 poentojn;
Lernejo B ... 448 poentojn;
Lernejo C ... 448 poentojn;
Lernejo D ... 447 poentojn.

Direktoro kaj instruistoj de la lernejo A ricevis grandajn ordenojn de la lerneja ministerio, sed direktoro kaj instruistoj de la lernejo D puniĝis per 30-elcenta redukto de la salajroj.

Tri monatojn oni ripetis la teston. Jen la okulfrapa rezulto:

Lernejo A ... 448 poentoj;
Lernejo B ... 448 poentoj;
Lernejo C ... 448 poentoj;
Lernejo D ... 449 poentoj.

Granda sukceso por lernejo D! Tri poentoj pli!
Terura malsukceso por lernejo A! Eĉ unu tuta poento malpli? Kial la gelernantoj ne plu lernis?



Sekve direktoro kaj instruistoj de la lernejo D ricevis grandajn ordenojn de la lerneja ministerio, sed direktoro kaj instruistoj de la lernejo A puniĝis per 30-elcenta redukto de la salajroj.

Ĉu vi pensas, ke tiu historieto estas pura fantazio? [Verkita en Aŭstrio].

WK

# PARTO KVINA

## La urso estas la plej danĝera besto.

Nenia savo!

Arbaristo:
„La urso estas ja la plej danĝera besto. Se ĝi persekutas iun, li devas nepre morti. Se li forkuras, post li kuras ankaŭ la urso; se li rampas sur arbon, post li rampas ankaŭ la urso; se li saltas en akvon kaj penas sin savi naĝante, post li naĝas ankaŭ la urso.“

Aŭskultanto:
„Kaj se oni sin kaŝas?“

Arbaristo:
„Tiam kaŝas sin ankaŭ la urso!“

De LENGYEL Pál, 1868-1932

Rimarko de Holli67 el Duolingo-diskutejo:

Mi devis pensi: „Kaj se oni mortpafas sin mem?" kaj nun havas la bildon de la sin mortpafanta urso en mia cerbo ...


Stulte rigardi povas ĉiu


Ŝercojn?
Ne!
Ĝis!